# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno.

Temo.

## Konfuziloj

En Esperanto ekzistaj vortoj, kiuj estas similaj aŭ kiuj estas similaj al ĉeĥaj vortoj, kiuj havas tute alian signifon. Ĉu vi bone konas tiujn vortojn? Ĉu vi scias, en kiu lingvo parolas anasoj? Venu en la klubejon kaj montru viajn konojn. Aŭ lernu novajn vortojn.

**Kiam:** la 12-an de novembro 2025 je **18.00** (UTC+1), la klubejo estos malfermita ekde 17.45

**Preparas**: Milan Kolka

**Lingvo**: Esperanto

**Kie:** Občanský klub, Hybešova 65a, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

Ĉeesta renkontiĝo, ĝi ne estos registrata.

# Ni rekomendas

- La 4an — 7an de decembro 2025 La 6a Virtuala kongreso de Esperanto. Rete, senpaga aliĝo por membroj de UEA ĝis 23an de novembro.
- La 6an de decembro 2025 Zamenhoffesto Vieno
- 1-a — 8-a de aŭgusto 2026 111-a Universala Kongreso de Esperanto, Graz, Aŭstrio

---

# Cetera programo en novembro

La 19an **Pri prestiĝo de Esperanto** – Alexander Zdechlik, *komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice*, rete per Zoom, je la 19a h.

La 26an **Sicilio kaj Italio** – Jana Zigal, la klubejo

# Programo en decembro

La 3an **Kion ni legas**, diskuto pri libroj en Esperanto, kiun vi legis, rete per Jitsi

La 10an **Antaŭkristnaska renkontiĝo**, la klubejo

La 17an **Kristnasko** – Ewa Caban*, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice*, rete per Zoom, je la 19a h.

Ankoraŭ mankas propone de programo en la klueboj por la 21an de januaro. Bonvolu proponi.

---

Sendado de la invitiloj per kaŝitaj kopioj kaŭzas problemojn. Jam kelfoje okazis, ke mi sendis invitilon kaj neniu ĝin ricevis. Tial ni elektis senpagan dissendan servon. Mi esperas, ke uzante novan rimedon ne plu estos problemoj kun ricevado de la invitiloj. Mi ankaŭ planas aldoni en retejon formularon, por ke iu ajn povu aboni niajn invitilojn sen rekte peti min.

## Esperantista klubo Brno

Bosonožská 323/15, Brno
Czech Republic

Vi recevis la mesaĝon, ĉar vi estas membro de Esperantista klubo Brno, ĝia favoranto aŭ vi petis aboni invitilojn de nia klubo. Se vi ne estas membro de la klubo, vi povas malaboni tiujn mesaĝojn.

Malaboni